

# Eŭropanoj dise opinias pri batalo kontraŭ klimata ŝanĝoj

Pierre Dieumegard,  
la 21an de februaro 2022

Dum aŭtuno 2021, Eŭropa Unio faris esploron Eŭrobarometro 517<sup>1</sup> « [La estonteco de Eŭropo](#) », per demandoj al pli ol 25 000 enloĝantoj, elektitaj laŭ landoj, seksoj, sociaj grupoj...

La demando QA17 estis : « Laŭ via opinio, kiuj estas, en la jenaj proponoj, la ĉefaj defioj tutmondaj pri la estonteco de EU ? ».

Listo de eblaj respondoj estis : [Problemoj pri medio kaj klimata ŝanĝiĝo, Riskoj pri sano, Migradoj kaj devigaj translokiĝoj, Terorismo, Organizita krimo, Malboniĝo de internaciaj rilatoj, Komputika militado kaj novaj formoj de konfliktoj, estonta kresko de populismo, Riskoj pro novaj teknologioj, Rapidaj ŝanĝiĝoj de niaj loĝantaroj, Malkresko de la proporcio de eŭropa loĝantaro rilate la cetero de la mondo]


La plej ofta respondo estis pri mediaj problemoj kaj klimataj ŝanĝoj (49 % por la tuta Eŭropa Unio).

Sed tiu averaĝo kaŝas grandajn malsimilojn : « Orientaj landoj » interesiĝas multe malpli ol la aliaj pri batalo kontraŭ klimata ŝanĝo.

Rumanoj estas nur 25 % kiuj taksas grava la medio, kontraŭ 72 % de la svedoj, tio estas triono. Kompare, ni ne trovas diferencon inter ambaŭ seksoj. Eĉ se junuloj iom pli maltrankviliĝas pro la medio ol la maljunuloj, la diferenco estas nur kelkaj elcentpunktoj.

Belgio	BE	Kroatio	HR	Nederlando	NL
Bulgario	BG	Irlando	IE	Aŭstrio	AT
Ĉeĥio	CZ	Italio	IT	Pollando	PL
Danlando	DK	Kipro	CY	Portugalio	PT
Germanio	DE	Latvio	LV	Rumanio	RO
Estonio	EE	Litovio	LT	Slovenio	SI
Grekio	EL	Luksemburgio	LU	Slovakio	SK
Hispanio	ES	Hungario	HU	Finnlando	FI
Francio	FR	Malto	MT	Svedio	SE

QA17 Grava defio por EU :  
problemoj pri medio kaj klimata ŝanĝo



<sup>1</sup> <https://europa.eu/eurobarometer/surveys/detail/2554>

La demando QA20 estis pri sama temo, sed kun iom malsimilaj vortoj, pli orientitaj al dezirebla agado : « Inter ĉiuj sekvantaj eroj, kiuj estas la du je kiuj nia socio insistas por alfronti la ĉefaj defioj de la mondo? (maksimume 2 respondoj) ».

La listo estis : [Medio kaj klimata ŝanĝo, Egaleco kaj socia justeco, Sano kaj sekureco, Edukado, Progreso kaj novigo, Libera komerco kaj merkata ekonomio, Kultura diverseco kaj malfermiteco al la aliaj, Tradicioj, Industria kapableco de Eŭropa Unio].

Ĉi tie ankaŭ, la diferencoj inter landoj estas pli grandaj ol inter sociaj grupoj. Nur 12 % de la rumanoj deziras vigran agadon pri la medio kaj la klimataj ŝanĝoj, kontraŭ 74 % de la danoj, sesoble pli multe. Eĉ se la estroj de firmaoj konsentas pli da gravecon ol la senlaboruloj, la diferenco ne estas granda.

**Konkludo : Malfacile estas kunigi eŭropanoj por komuna politiko pri medio. La malsimiloj inter landoj estas multe pli grandaj ol la malsimiloj inter sociaj grupoj : la loĝantoj de iu lando ne komprenas la zorgojn de la loĝantoj de alia lando.**

**Verŝajne tiuj malsimiloj inter landoj estas litaj al malsimiloj inter lingvoj. Por havi publikan opinion je la nivelo eŭropa, necesas publikan diskuton je la eŭropa nivelo, kaj do komuna lingvo. La plej bona komuna lingvo estus Esperanto, lingvo simple lernebla, preciza kaj justa.**



